

La letero de l' Akademio de Esperanto

N° 6 – januaro – februaro – marto 1989

ISSN 0986-1181



Unu el la ĉefaj taskoj de la Akademio estas kontroli la evoluon de nia lingvo! Tio aparte koncernas la novajn vortojn: por la Akademio tio inkludas ankaŭ ĉiujn vortojn, kiuj estas nek Fundamentaj, nek Oficialaj: ili devas konformiĝi kaj kongrui kun la pli fruaj vortoj.

Almenaŭ teorie tio povas konduki nian institucion oficialigi vortojn sub formoj iom malsamaj de la nun praktike uzataj. Tio jam okazis, cetere ne ĉiam prave. Tio denove povos okazi, se nur escepte.

Efektive ordinare la Esperantistoj ŝatas sian lingvon; ili kolektive havas bonan senton pri ĝiaj bezonoj; sekve plej ofte -sed ne ĉiam- ili mem elektas la ĝustan formon, eĉ se pli frue aperis formo malpli bona. Tial la Akademio nur malofte bezonas interveni.

Kiam ĝi intervenas, ĝi unue devas fari laboron de leksikografio aŭ studi jam faritajn laborojn. Nuntempe ni havas bonajn leksikografojn. Ili apartenas al du kategorioj, eble sub influo de la kutimoj en la respektivaj naciaj lingvoj, eble ne.

Unuj opinias, ke ili rajtas noti nur la efektivan uzon, sed nenion alian. En iuj naciaj lingvoj oni tiel konstante agas: iuj referencas, ekz-e, al la reĝa parolmaniero kaj registras tiun manieron kiel la norman; por aliaj la referenco estas la popolo, sed la diferenco ne estas esenca por nia konsidero.

Sed aliaj niaj leksikografoj, se ili ne tiel same zorge notas la uzadon, tamen permesas al si alnoti sian (studitan) opinion, ke jen tiu detalo, jen tiu alia, ne estas bona kaj ke oni preferu tion alian. Same en aliaj naciaj oni tiel kondutas: la vortaroj donas konsilojn; ordinare iu akademio aŭ simila organismo donas direktivojn kaj detalajn konsilojn: la vortaroj disvastigas ilin.

Ni konstatu, ke PIV prefere apartenas al la dua kategorio: ĝi (avare) indikas diversajn formojn, kiel pli bonajn per resendo al tiuj ĉi. Ankaŭ vidu, ekz- ĉe ingredienco kaj ĉe precedenco; por ambaŭ oni preferu formojn kun finaĵo ento: ne estas la loko por nun indiki la aprobindajn motivojn.

En la diversaj naciaj lingvoj oni atentus tiajn konsilojn: la demando estas, ĉu la Esperantistoj ŝatas atenti ilin? Ni mem prefere opinias, ke almenaŭ la legantoj de LA LETERO tendencus ilin atenti. Tamen la atendado al tiaj konsiloj estas multe pli grava en nia lingvo, kiun iuj nomas, eble prave, "planlingvo". Tiaj konsiloj utilas por ke la lingvo konservu siajn Fundamentajn principojn kaj interalie sian simplecon kaj sian koherecon.

Evidente la Akademio de temp'al tempo eldonas tiajn konsilojn kaj ĉiuj laŭcelaj Esperantistoj zorge atentus ilin. Almenaŭ ĉi tio estu la bondeziro, kiun mi formulu al niaj legantoj sojle de la nova jaro!

André ALBAULT

LA ROLOJ DE LA AKADEMIO

La tri eblaj manieroj de agado

En mia kontribuo al la Serta in honorem Régulo:" La Akademio de Esperanto: starigo kaj esenca rolo "(5. 35) mi skribis:

"Entute tri manieroj de agado estis eblaj.

La unua estis la desupra dekretado kiun rifuzis kaj Zamenhof kaj la Lingva Komitato. Kompense tio estis la starpunkto de la Delegacio kaj de la ĝin sekvanta "Akademio di Ido": ĝi dekretis ŝanĝojn kaj novajn regulojn laŭ konstanta fluo; ĝi ankaŭ nuligis jam faritajn ŝanĝojn kaj regulojn kaj anstataŭigis per novaj... ĝis fine ĝi dekretis paŭzon en la modifado-fluo...Ido malaperis.

La dua konsistis el konsilado kaj tolerado.

La tria estis kontrolado kaj sankciado de la efektiva uzado.

Finfine ja la tria maniero estis preferata. Konstateble ĝi estis daŭre aplikata de la Lingva Komitato kaj de ties Akademio. Post la Dua Mondmilito la nova "Akademio de Esperanto", kiu eliris el tiuj pli fruaj institucioj, restis fidela al tiu saĝa farmaniero.

La ideoj de Zamenhof

Tamen la ideoj de Zamenhof estis ankaŭ aliaj: li komprenis la neceson de organismo, kiu povus respondi anstataŭ li, kaj kiu ankaŭ povus solvi dubajn punktojn, kaj eĉ kiu eventuale povus studi modifojn de la lingvo.

Tiu lingva organismo devus esti (Serta, P.23)

"forta kaj aŭtoritata, komune akceptita" (L.1,31)

Ĝi faros "revizion de la tuta lingvo unu fojon por ĉiam, nur per vojo laŭleĝa" (L.8,331).

"Poste ĝi nur kontrolos PASIVE (L.8,117); ĝi "solvos per voĉdonado diversajn dubojn, pri kiuj oni ĝin demandas (s.l.) Fine "ĝi povos entrepreni iajn laborojn, sed ĝi tute ne havos la devon tion ĉi fari" (s.l.).

"En tiuj cirkonstancoj Akademio povus esti danĝera... sed mi ne volas preni la aferon sur min" (L.2,95): li ne volas esti "leĝdonanto" nek "kondukanto" (L.2,85); "la aŭtoro ne havas privilegion fari ŝanĝojn" (L.2,87).

Male li opinias, ke "en aliaj cirkonstancoj (komuna akceptiteco) estonta aŭtoritata Akademio povos fari aliajn ŝanĝojn eĉ tute arbitrajn kaj rompantajn" (L.3,33).

Esplorado kaj modifado unu fojon por ĉiam

En 1906 Zamenhof skribis: "ĉiu Esperantisto havas plenan rajton proponi al la voĉdonado de la Lingva Komitato, ĉion kion li volas" (L.7,405). Li verŝajne ĉefe pensis pri la Delegacio: tion li konfirmas pli poste: "La Delegacio prezentu siajn reformajn decidojn al la Lingva Komitato" (L.8,108). Sed li konfirmis ankaŭ sian alian opinion: "La lingvo devas pliperfektigi nur per evolucio natura sub kontrolo de nia Akademio" (L.8,322). Sed li sentis la bezonon "meti finon al ĉiuj postuloj de plibonigo" (L.8,331-335). Li eĉ pri tio konsilis la gvidantoj de la Lingva Komitato kaj de ties Akademio: "mal-kontenteco ne finiĝos, se ni ne metos klare kaj energie finon al la tuta demando: la Akademio unu fojon por ĉiam atente esploru la tutan lingvon, enkonduku per unu fojo ĉiujn plibonigojn kaj poste deklaru, ke la lingvo por ĉiam fariĝis definitiva" (L.8,344).

Bazaj taskoj (Serta, 27)

Per la 17-a Cirkulero (4 Jul 08) Prezidanto Boirac anoncas al siaj Kolegoj, ke ili devos respondi i.a. al jena demando: "Kiuj proponoj estas studeblaj kaj solveblaj de la Lingva Komitato kaj kiuj proponoj estas principe neesplorableblaj?". Plie, li komentas: "Ĉiujn laborojn, ĉiujn diskutojn kaj polemikojn, kiuj okazis pri la lingvaj demandoj, la L.K. povos utiligi por la bono de nia lingvo. Laŭ mia persona opinio, ni devas havi nenian antaŭjuĝon kontraŭ iu

.../...

ajn plibonigo, kondiĉe ke tiu plibonigo ne kreu rompon kaj respektu la kontinuacon de nia lingvo. Nia glora Majstro mem donis pri tio tre klarajn kaj tre saĝajn konsilojn en la antaŭparolo de la Fundamento " (F-to, 43-49 §A8, P.48; kp.p.289).

En la kvara U.K. (Dresdeno, 1908) la L.K. aprobis la "deklaracion de Boirac", kiu tekstas:

" La tasko de la L.K. estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucio. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la suprediritaj principoj. Neniel la Fundamento povas esti baro por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili, kontraŭe, certigas." "Dank'al la fondo de la Akademio, la L.K. nun praktike reorganizita, publikigos antaŭ la fino de la jaro, kiel oficialan aldonon al la Universala Vortaro, la rezultaton de la jam faritaj laboroj; poste aperos studoj pri la teknika vortaro kaj pri la sintakso". Trankvile kaj firme, laŭ la konsilo de nia Majstro, Esperantistoj, ni povas iri nian vojon ". (G.4, 140).

Revolucio aŭ evolucio ?

Prezidanto Boirac (Cirkulero de 1 Feb 09) prezentas sian firman opinionon jenan: "Ĉiujn novaĵojn, kiujn oni povas enkonduki en Esperanton, ne misformante, sed kontraŭe plenigante kaj perfektigante ĝin, la Lingva komitato povas kaj devas esplori; ĝi devas kontraŭe formeti pli malpli definitive ĉiujn proponojn, kiuj ne havas alian celojn ol kontentigi pure teoriajn postulojn, kaj farus la lingvon pli malfacile uzebla aŭ eĉ nerekeblebla, sen ia ajn praktika util-eco " (G.21, 310).

En sia Cirkulero Boirac konfirmas, ke senĉese alvenas novaj proponoj; tial, konsente kun Zamenhof, li pretigis liston de la ĉefaj el ili: "Do, se post zorga esplorado la Akademio esprimos pri ili firmajn kaj pravigitajn opiniojn, oni povas pensi, ke ĝiaj decidoj, kia ajn ili estos, metos certe finon al ĉiuj eblaj duboj kaj ŝanceliĝoj, kaj la rolo de la Akademio povos de tiam konsisti nur en la esplorado de detalaj proponoj pri la iompostioma riĉigado de la lingvo laŭ la bezonoj de ĝia normala evolucio". (G.21, 310-311).

Sekvas listo de tiuj ĉefaj proponoj: ĝi estas prezentita kiel listo de 15 demandoj. Sed preskaŭ unuanime la Akademio forĵetas la 7 unuajn kaj la 11-an kiel kontraŭajn al la esencaj principoj de la lingvo: temis ekz-e pri la finaĵo de la pluralo, pri la ekzisto de la akuzativo, pri la formo de iuj pronomoj kaj pri la ŝanĝblo de la adjektivo; unuvorte, pri tiaj esencaj detaloj, kiuj ŝanĝus la lingvon ĝis nerekebleco. Tio ne estus pensebla por iu ajn lingvo. Tamen la unua demando temis pri la alfabeto: ĉu oni forigu la supersignojn? Ankaŭ tio ŝanĝus la eksteran aspekton de la lingvo, kvankam pli ol unu lingvo aliris al tiaspeca reformo por la komforto de siaj uzantoj; sed tio estas alia afero: la tiama Akademio ĉiokaze opiniis, ke la momento ne estas favora por tia danĝera paŝo. Restis 7 aliaj demandoj, kiujn la Akademio deklaris tolereblaj: unu el ili proponis 14 afiksojn; pluraj el tiuj afiksoj hodiaŭ estas oficialaj; aliaj meritis esti; fine la aliaj plejparte ne estas uzataj.

Primetoda alternativo

Kiel la Akademio studu tiujn tolereblajn demandojn? Boirac formulis tiun demandon kiel alternativon, jene:

"Kelkaj el niaj kolegoj opinias, ke la Akademio havas nenian juĝon por esprimi, nenian decidon por fari, almenaŭ nuntempe pri ili. Al la partianoj de tiuj novaĵoj(...) apartenas ja ilin ekprovi je ilia propra risko kaj danĝero; se la komuna uzado ilin alprenos, post kelkaj jaroj, la Akademio povos ilin oficialigi, sed nur tia devas esti ĝia rolo." "Aliaj opinias, ke la Akademio respondus pli bone al la atendo de la publiko, provante montri, kiuj el la proponitaj novaĵoj eĉ ne meritas esti ekprovataj, ĉar ili povus okazigi nur bedaŭrindajn komplikiĝojn aŭ misformiĝojn de la lingvo...; kaj kiuj povas esti tolerataj, ĝis la komuna uzado ilin defaligos aŭ rekomendos kaj fine trudos al oficialigo" (G.21, 314).

.../...

Boirac konkludas : "Tie do kuŝas principa demando, kiun estas necese antaŭsolvi..."
Kaj li petas opini-esprimadon, sed la demando neniam estos solvita per voĉdonado sed per nura praktikado!

Raporto pri neologismoj kaj kompromiso

En sia tria Cirkulero (1 Aŭg 1909) Boirac prezentas raporton pri neologismoj kaj memorigas, ke la Akademio jam formetis la "kontraŭ-Fundamentajn"; sed pri la ceteraj li ankaŭ memorigas, ke pri ili : "stariĝas la demando ĉu la Akademio povas fari decidojn aŭ almenaŭ esprimi juĝon, kun la celo direkti la komunan uzadon ?" (G.21,315-316-). Sed Boirac konstatas la ekziston de du tute malsamaj sintenoj: "Kelkaj diras, ke la Akademio devas nur studi la lingvon, konstati kaj oficialigi la uzon, kaj ke, sekve, ĝi ne devas eĉ konsili". "Aliaj rimarkigas, ke la Akademio utilas por nenio, se ĝi ne almenaŭ konsilas, rekomendas aŭ malrekomendas, kaj ke fakte, la pli granda parto de la Esperantistaro postulas de la Akademio direktan kaj reguligan agadon" (s.l.)

Tiam la Prezidanto proponas kompromison anstataŭ voĉdonado:

"La Akademio povus esplori demandojn... kaj post interkonsiliĝo raportu publike, sed nur en formo de konsilo. Se la praktiko montros, ke la tiel konsilita uzado respondas al la komuna sento..., tiam... la L.K. povos oficiale sankcii ĝin" (s.l.)

Subtila diferenco

"La diferenco estas subtila; la Akademio laŭ tiu kompreno ĉefe studos la lingvon, sed sankcios nur laŭ la uzado: tio estas la unua vidpunkto. Sed forta koncedo al la dua opinio estas, ke la Akademio publiku raporton pri sia esplorado donante konsilojn: la konsiloj ja ne devos esti nepre obeataj, krom se ili plaĉos al la legantoj." (Serta, 33). Per tiu kompromiso enkondukiĝis ambigueco, kiu ne estis restonta sen konsekvenco: ni citu por ekzemplo la demando de la landnomoj kaj de la sufikso, demando, kiun mi detale studis aliloke. Tiam sekvis dua serio de 15 demandoj. Ĉefe temis pri demandoj relative al la jam prezentitaj afiksoj neologismaj; po studeto akompanis ilin. La L.K.-anoj devis respondi per jes aŭ ne por ĉiu el ili al la demando: "Ĉu vi akceptas, ke la Akademio konsilu la provan uzadon de tiu neologismo?"

Notindas, ke neniu demando ricevis la necesan absolutan plimulton por esti akceptitaj, krom la du lastaj, kiuj koncernas ŝarotajn studojn! Nome, studoj pri la maniero elekti novajn radikojn kaj starigi regulojn pri derivado.

Kaj mi komentis en mia kontribuo al la Serta: "Tiu diferenco inter la detala opini-esprimado dum la diskutado kaj la fina voĉdonado estas signifoplena. Eĉ por la punktoj por kiuj preskaŭ ĉiuj Akademianoj konsentis dum la diskutado, pozitiva decido estis rifuzita ĉe l'voĉdonado. Tio signifas, ke dum la diskutado ili pretis konsili kaj doni sian opinion; sed ĉe la voĉdonado ili sentis alian respondecon aŭ pli atentis la prezentitajn kontraŭargumentojn: ili ne volis konsili eĉ "la provan uzadon". Tion faru "je sia propra risko kaj danĝero" la uzantoj, verkistoj aŭ praktikantoj..." (S.35)

Konkludo

Sekve mi konkludis, "ke per tiu voĉdono la Akademianoj praktike alprenis la decidon, ke la rolo de ilia kolektivo, la rolo de la supera lingva instanco aŭ Akademio, ne povas esti konsilado por la uzo de la nova, de io ankoraŭ ne sufiĉe elprovita: la Akademio devas kontroli la evoluon, ĝi ne devas iniciati ĝin; ankoraŭ malpli ĝin regi, ĝin direkti."

(daŭrigota)

*
* *



KRONIKO de la NUNTEMPO

SUPERRIGARDO DE NEOLOGISMOJ: LA KAZO DE "SGRAFITO"

Avertoj kontraŭ eraroj

Inter siaj pluraj leksikologiaj esploroj, la direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto kolektas donitaĵojn pri neologismoj (1) aperantaj en nuntempe publikigitaj tekstoj, kaj ankaŭ ekzamenas glosarojn kaj alispecajn vortlistojn, en kiuj neologismoj estas amase registritaj. Generale tiuj novismoj ne estas adekvate glositaj, ĉar ili ne ricevas plenan dokumentadon akompanatan de konvinkaj argumentoj por pravigi ilian uzadon. (2).

Unu el la taskoj de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro povas esti konstanta superrigardo de tiu leksika materialo. La celo de Akademia kontrolado ne estos aprobo aŭ kondamno de vortoj, kiuj ne ankoraŭ ne havis sufiĉe da tempo por montri, ĉu ili estas utilaj aŭ balastaj; ĝi servu precipe por atentigi tuĵ pri eventaj eraroj en la formo de vortoj kaj iliaj difinoj. En tiu maniero estos eble malhelpi, ke ne konvenaj radikoj disvastiĝu kaj eventuale enradikiĝu en la lingvo. Por ke analizado kaj decidoj estu objektivaj, estos necese formuli principojn por la asimilado de etimoj el diversaj fontlingvoj kaj ankaŭ starigi gvidliniojn pri normoj de internacieco, neambigueco kaj harmonio kun la ekzistanta leksiko de Esperanto.

La neologisma glosaro de Rikardo Ŝtalo

En 1987 estis publikigita glosaro de neologismoj enhavanta iom pli ol 250 kapvortojn, ĉerpitajn el diversaj antaŭe publikigitaj vortaroj kaj glosaroj kaj ankaŭ plurajn sen fontindiko, kiuj plej probable estis elpensitaj de la komiplinto mem (3). Konsultontoj estas avertitaj, ke tiu ĉi verko ne eestis kunmetita en lingvistike kompetenta maniero. La subtitolo mem - "Necesaj neologismoj por ne-necesaj poetoj, gekielvifartasuloj kaj krokodiloj" - rivelas la malseriozecon, eĉ diletantecon, de la aŭtoro. Analizado de la formoj kaj signifoj de pluraj kapvortoj montras, ke ne okazis aplikado de konsekvencaj reguloj por asimilado de etnolingvaj etimoj; plue, troviĝas difinopj, kiuj ne akordas kun la signifo de la koncernaj vortoj en la fontlingvo kaj ankaŭ aliaj etnolingvoj. Sekve, ĉe multaj registraĵoj mankas kaj morfologia kaj semnatika internacieco.

Kion signifas "sgrafito" ?

Ekzemplo de neologismo kun tute erara difino estas "sgrafito".

sgrafit/o. 2) (fi) Skribaĉo, (fi) pentraĉo, (fi) desegnaĉo k.s. en publikaj lokoj, ekz. en metroo, stratoj, klozetoj k.s. angle: the graffito, the graffiti (pĝ.29). Kvankam tiu difino de "sgrafito" estas la dua, Ŝtalo ne informas, kie troviĝas la unua, primara, registraĵo. Tiu mankanta referenco estas Slipara Vortaro. Jen la difino sur slipo datiĝanta de la jaro 1974.:

Veter-rezista mur-pentraĵo ĉe kiu la desegno estas enskrapita en ankoraŭ malsekan farbon. A.sgraffito drawing, graffito drawing. F.Sgraffite, GT.Sgraffito, Kratzmalerei, Kratzputz.

Tiu ĉi difino estas mankhava, ĉar unue, ĝi pritraktas nur unu specon de "sgrafito", kaj due, ĉar ĝi ne sufiĉe precize proskribas la procedon por diferencigi ĝin de tiu uzata por fari graffiti.

Reviziita difino de "sgrafito"

"Sgrafito" estas arthistoria kaj artmetia faktermino, uzata en multaj etnolingvoj laŭ la originala itala formo sgraffito. Ĝi estas la pasiva participo de la verbo sgraffire signifanta "ungograti". Laŭ la 15-a regulo de la Fundamenta gramatiko, ĝi povas esti asimilita facile en Esperanto kiel "sgrafito". Jen preciza difino:

1. (Arkitektura dekorado)-Tekniko dekori mur-surfacojn per forskrapado aŭ eltranĉado de partoj de la supraĵa tavolo el gipso aŭ mortero, por ke la desegnaĵo aperu sur la subkuŝanta tavolo havanta kontrast-an koloron.
2. (ceramika dekorado)-Tekniko dekori surfacojn de ceramikaj objektoj per forskrapado de partoj de la supraĵa tavolo el argilo aŭ glazuro, por ke la desegnaĵo aperu en la kontrasta koloro de la argilo de la objekto.

Kio estas graffito/Graffiti ?

Stalo misinformas, ke graffito/graffiti estas la angla ekvivalento de "sgrafito". Graffito, kies pluralo estas graffiti, estas italdevena same kiel sgrafito. Ĝia baza signifo estas "gratado (per ungo)". La diferenco inter la 2 vortoj estas, ke la prefikso s en sgrafito indikas, ke temas pri for-, dis- aŭ elskrapado, dum la senco de graffito estas desegnaĵo aŭ skribo farita origine per enskrapado aŭ gravurado, poste ankaŭ per skribado aŭ pentrado. Graffiti estas arkeologia kaj epigrafia faktermino ampleksanta ĉiuspecan surskribaĵon aŭ desegnaĵon divers-teknike metitan sur surfacon de muro, roko aŭ alia materialo aŭ objekto. Graffiti estis desegnitaj surmuroj de paleolitikaj grotoj fare de prahistoriaj homoj kaj sur ŝtonaj monumentoj de la romia imperio fare de soldatoj. En romiaj urboj lerneĵ-buboj petoleme "ornamis" murojn kaj aliajn surfacojn per siaj skribaĵaĉoj kaj desegnaĵoj. Historiistoj kaj epigrafistoj kolektas kaj studas tiun dokumentaĵon de la pasinteco, dum la pli efemeraj modernaj graffiti havas intereson por sociologoj kaj folkloristoj.

Esperantigo de Graffiti

La vorto graffiti estas uzata senŝanĝe en multaj etnolingvoj, do ĝi estas internacia vorto. Tamen, ne estas eble esperantigi ĝin kiel "grafito", ĉar tiu ĉi vorto jam ekzistas kiel la nomo de nigra mineralo el karbono. En la angla-Esperanta vortaro de J.C.Wells (1969) la traduko de A.Graffiti estas "murskribaĉoj". La itala-Esperanta vortaro de Instituto Italiano di Esperanto (1981) donas kiel ekvivalenton de I.Graffito "murdesegnaĵo". Proponoj de la redakcio de KERNO-Cirkulero (n-ro 5, marto 1987, pĝ.4) estas "farboskribo" aŭ se temas pri desegnoj, "ŝpruc-farbaĵo". La pravigo baziĝas sur la nuntempa uzo de graffiti por "la desegnaĵoj, sloganoj ktp metitaj sur murojn per ŝprucfarbo aŭ simile". En Literatura Foiro (n-ro 87, 1984, pĝ.16) aperas du malĝuste formitaj vortoj, "grafitaĵo" kaj "ŝprucfarbo", kiuj ne taŭgas por esprimi la koncepton. La objekto kontraŭ ĉiuj ĉi-supre menciitaj vortoj, estas ke ili limigas sin al nur unu formo aŭ unu tekniko. Bezonata en Esperanto estas termino, kiu havas la saman semantikan amplekson kiel graffito/graffiti. Tia vorto estas la neologismo "grafitio", registrita en Dictionary Museumologicum (4) kun la sinonima esprimo "surmuraj skribaĉoj".

Urĝeco de la superrigarda tasko de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro

La analiz-metodo ilustrita entiu ĉi artikolo montras sen ombro de dubo, ke superrigardo de neologismoj estas bezonata. Laŭ mia scio, ĝis nun nur unu organizaĵo provis entrepreni tion: Komisiono de Esperanto-Redakcioj pri Neologismoj (KERNO), kiu funkcias sub la aŭspicioj de la magazino Monato. Ĝi havas neniun aŭtoritaton por esperantistoj ĝenerale, kaj la efiko de ĝiaj sporadaj rekomendoj ne estas sentebla. Cetere, la nivelo de la prioritakto de vortformoj en KERNO-Cirkulero estas malalta laŭ esperantologia vidpunkto.

Per detala publika informado pri la semantika eraro en la difino de "sgrafito", registrita en la glosaro de Rikardo Stalo, la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto admonas tro entuziasmaj neologismemulojn kiel la adeptojn de la Praga Artliteratura Skolo, ke ili ne aldonu "sgrafito" al siaj abundaj kaj redundaj listoj. Bedaŭrinde, povas esti, ke la averto venas tro malfrue, ĉar la verko de Stalo estis publikigita en 1987.

.../...

.../...

Notoj

1. Difinoj de la vorto "neologismo" troviĝas en jenaj artikoloj:
 - a) Bernard GOLDEN. Tri difinoj de la vorto "neologismo".
Esperanto aktuell. 1986 aprilo; 5 (2):14-15.
 - b) Edwin DE KOCK. Difini la vorton neologismo. "La Letero de l'Akademio de Esperanto." 1988 aŭgusto-septembro; 4:4-6.
2. Bernard GOLDEN. Neglositaj neologismoj. La Letero de l'Akademio de Esperanto. 1988 januaro; 2:3.
3. Rikardo STALO (pseŭdonimo). Ĉiu-tagaj vortoj kun difinoj. 1987. 30pĝ.
4. DICTIONARIUM MUSEOLOGICUM (20-lingva muzeologia fakterminaro). Red. de Istvan ERI kaj Béla VEGH. HEA, Budapest 1986:774 pĝ.

Bernard GOLDEN direktoro
Sekcio pri Ĝenerala Vortaro

Demandoj kaj respondoj (sekvo)

D.-Kion la Akademio opinias pri radikoj kun duoblaj konsonantoj, t.n. nonoismoj? (C.G.G.)

Se la duoblaj konsonantoj ne ekzistus en Esperanto, kiel do - obeante la Fundamentan Regulon 9 - prononci la vortojn: ekkrei, ellitiĝi, elabori, kaj multajn dekojn da aliaj, kiuj devige enhavas duoblajn konsonantojn, ĉu prononci: ekrii, elitiĝi, elabori...?

Suomo estas tute kulpa vorto: devus esti minimume Suom/Suomanoj laŭ la Finna lingvo (Suomi - Suomalainen).

Vato estas el la sama faruno: ĉiutage uzate de kuracistoj, ĝi estas kotonsimila materialo laŭ la Fundamento; sed pro siaj elektraj aparatoj la kuracistoj uzadas ankaŭ vattojn. Estas vero, ke oni povus diri ankaŭ wato aŭ watto, se oni atentus la proponojn faritajn de Verax antaŭ 1914! Verfakte duoblaj konsonantoj estas allaseblaj, ĉar prononceblaj, nur sub unu kondiĉo: silabolimo disigu la du konsonantojn. Tiel same por la h apud (antaŭ aŭ post) konsonanto: Buddha fariĝas aŭ Bud-do aŭ Bud-ho; kiel la Fundamenta mir-ho. La duoblaj konsonantoj utilas por propraj nomoj kaj malmultaj kulturvortoj! (A.A.)

D- Kial ekzemple sur la titola paĝo de "La Letero" de oktobro 1987 legiĝas "getto" anstataŭ "ĝeto"? (C.G.G.)

Ekzistas vortoj proksimaj unu al la alia, kiujn estas oportune kontraŭstarigi fonetike: gesto, ĝeto aŭ getao (Japana sandalo) kaj getto. D-ro L.L. Z Zamenhof uzis eĉ "ghetto", kvankam tiam la "h" restas malfacile prononcebla. (J.T.)

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D." Mia demando (aŭ propono) rilatas gramatikon de Esperanto. Ekzistantas kaj aĉeteblas **PLENA ANALIZA GRAMATIKO** de ESPERANTO. Temas pri la vorto "analiza", do en tiu libro estas tro multaj eblecoj uzi iun gramatikaĵon, ĉar estas nur prezentitaj diversaj formoj, kiujn uzas diversaj aŭtoroj, kaj la simpla esperantisto plu ne scias, kiun formon aŭ gramatikaĵon uzi. Do, ĉu estas planata eldoni gramatikon, sed ne analizan nur ordinaran, tio estas tia, el kiu simpla esperantisto povus forigi siajn dubojn gramatikajn.

(Stanislas POCHANKE-Pollando)

R.-" Neniam **PLENA ANALIZA GRAMATIKO** celis informi "simplan esperantiston": tiucele estas faritaj la lernolibroj. **PLENA ANALIZA GRAMATIKO** estis verkita por instruantoj, aŭtoroj, verkistoj, literaturistoj, lingvistoj; simpla esperantisto devas simple apliki la regulojn de sia lernolibro! (J.T.)

D.-" Ekzistas **TEC**, do Terminologia Esperanto-Centro, institucio de UEA, kiu, analogie al naciaj normigaj institucioj, produktos Esperanto-normajn terminarojn. Aliflanke ekzistas, analogie al la naciaj institucioj, la plej alta lingva institucio, la Akademio de Esperanto. Ĉu mi bone komprenas, konsiderante la statuton de la Akademio, ke la normaj terminaroj, submetotaj en la lasta aproba paŝo al prikonsidero fare de la Akademio estos per la Komisiono por aprobo de fakaj vortaroj prikonsiderata ne el faka vidpunkto, sed el punkto de la fundamenteco? Ĉu la akademianoj povus esprimi siajn opiniojn pri estonta rilato aŭ kunlaboro de la terminologia centro kaj la Akademio? Ĉu la akademianoj konsideras taŭga la disdividon de la kompetento pri faka lingvo kaj komun-uza lingvo?

(Inĝ. Jan POSPISIL, Ĉeĥoslovakio)

R- **TEC**, la Terminologia Esperanto-Centro neniel estas analoga al "nacia normiga institucio", ne pli ol UEA analoga al nacio!

Tradicie nur la Akademio estas normiga institucio, la Terminologia Esperanto-Centro nur prepare helpas al la formulado de fakaj terminaroj, kiujn aŭtentigas aŭ ne la Akademio. Cetere la disdivido inter faka kaj komun-uza lingvoj estas simpla fakto komuna al ĉiuj kulturaj lingvoj. (J.T.)

.../...

KUN LA VENONTA PRINTEMPO KOMENCIĜAS NOVA JARO, KAJ LA ASOCIO "LA AMIKOJ DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO" BEZONAS NOVAN KOTIZON: LA MEMBROJ DE LA ASOCIO BONVOLU NE FORGESI SENDI SIAN KOTIZON DE 100 FRF POR 1989... SAMTEMPE - SE BEZONE - LA REABONON AL "LA LETERO". (120 FRF).

Bonvolu sendi la pagilon al Poŝtĉekkonto 735 27 B PARIS (preferinde).

"La Letero de l' Akademio de Esperanto", trimestra informa letero eldonita de "la Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio

Direktoro: André BOURDEAUX Redaktoro: Jean THIERRY Presejo: E 12 C.P.P.P.: n-ro 69710
1 n-ro: 40 FRF Jara abono: 120 FRF. Pagebla ĉe kontoj:

Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris

U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Peranto por tuta Nordo: S-ro Jan SOSNIECKI, Dalslandsgade 8, M 201 DK-300 Kopenhago S. Danio Poŝta ĝiro: 8 55 56 72

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, TOKYO, 153- Japanio

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur. 3493; villa Olimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.